

Evento de la 51-a U. K.

BUDAPEST

La tutmonda esperantistaro jam amasiĝis antaŭ 36 jaroj en la hungara ĉefurbo : la vasta, brila koncerthalo de la apud-rivera Duna Reduto fajris de entuziasmo, kiam 1200 kongresanoj solenis la malfermon de la 21a U.K., de verdstela paca renkonto. Paca, jes, laŭ volo kaj deziro de la partoprenantoj, je sojlo de l'epoko faŝisma, militema, Aŭgusto 1929 ! La hungara esperanto-movado enspiris liberan spiriton, naskiĝis grandaj espero, sed, ...nur eta tempo pasis kaj fulme trakuris la terglobo la memorinde terura, ekonomia krizo, disskuante multloke ankaŭ nian movadon.

Kaj tiam evidentiĝis, kiel grave fortigis tiu Kongreso la esperanto-movadon en Hungario. La hungaraj esperantistoj levis malgraŭ ĉiuj obstakloj pli alten la standardon de la esperanta kulturo. Ekestis glora epoko de nia kulturo, prezentis sin vico de novaj, modernaj verkistoj kaj poetoj esperantaj. La revuo « Literatura mondo » fariĝis


subgvide de hungaraj esperantistaj poetoj K. Kalocsay kaj J. Baghy, fokuso por freŝaj talentoj. La Universala Kongreso rezultigis tiun tempon, kiam seren-mienaj hungaraj esperanto-profesoroj fervore klarigis la 16 regulojn de Lingvo Internacia, norde kaj sude, okcidente kaj oriente, en urboj kaj vilaĝoj de la lando, por novaj aroj de adeptoj.

Post triono de jarcento denove en Budapeŝt amasiĝas la esperantistoj, sed ili tute aliajn cirkonstancojn trovas. Kiom turniĝis la rado de historio mondscale kaj enlande ! En Hungario — iama lando de tri milionoj da mizeruloj — nuntempe nenie ekzistas la iama mizero. Hodiaŭ jam libere spiras la hungara popolo, la ĉiutagaj homoj, inter ili ankaŭ la esperantistoj.

La esperanto-movado nuntempe jam ĝuas fortan apogon ĉiurilatan. En pacama atmosfero ĝin helpas fervore la registaro, sindikatoj, uzinoj kaj kulturpalacoj. Krome



Budapest : Parlamentejo.



BUDAPEST. — Vidajo sur la Reĝa Fortikaĵo : Statuo de reĝo Sankta Stefano Fiskaptista bastiono.